Heinrich Heine,

Malseka veturo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Nombradis ĉiujn ondojn mi,
ĉe l' mast' min apogante.
Adiaŭ, kara vi patruj',
Veturas mi mallante.

Mi pretervenis ĉe la dom'
De mia karulino;
Sed rigardadas vane mi,
Ne mane svingas ino.

Vi larmoj, ho, retenu vin,
Ke mi ne eĉ blindiĝu,
Ke ne pro la tro granda ve'
La kor' en mi rompiĝu.

Traduko de la Germana poemo "Wasserfahrt" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2004-03-13.*

MR-114-1 / Arg-208-416 (2004-03-13 22:52:00)

La poemo troviĝas en la poemkolekto „Libro de la kantoj“, sekcio „Junaĝaj suferoj – romancoj“, n-ro XIV.